

Leterujo, 5a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 584 1974.12.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kvaran kaj konkludan elsendon ni dediĉas al babilado kun niaj geaŭdantoj. Alvenis poŝtaĵoj el 19 landoj : Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando.

A.- Kelkaj geaŭdantoj petas al ni servojn por interŝanĝo de gazetoj, por malkovro de korespondemuloj kaj diskonigo de lokaj novaĵoj. Ni ne estas ekipitaj por respondi al similaj petoj. Sinjoro *Wenzel Weber* en *Münchengladbalm*, Germanio okcidenta, sinjoro *R. Devendeville* en *Faches-Thumesnil*, Francio, kaj aliaj bonvolu do direkti siajn petojn al UEA-delegitoj en la koncernaj urboj.

Cl.- Sinjoro *Henry Palmes* en *Bristol*, Britio, sinjoro *Lennart Aberg* en *Gotenburgo*, Svedio, sinjoro *John Brownlee* en *Upminster*, Britio, doktoro *J. Kondor* en *Neuwies*, Germanio okcidenta, sinjoro *Erik Lundvall* en *Borlänge*, Svedio kaj gesinjoroj *Phyllis kaj Bruno Najbaro* en *Keighley*, Britio, esprimis sian intereson por la varieco de niaj prelegtemoj kaj por la raporto pri la vivo en Svislando, kiun faras niaj radio-kolegoj gesinjoroj *Arthur Baur*. Tiuj gekorespondantoj diras sian intereson por la kreĝanta Kultura Centro Esperantista kaj ties Internacia Feria Altlernejo en la urbo La Chaux-de-Fonds kaj por la priskribo de tiu montara regiono. Pluraj deziras ricevi la programon de la tie okazontaj kursoj. Pri ĉio tio ni havos la okazon reparoli dum la venonta jaro kaj estas tre volonte, ke ni diskonigos la kursprogramojn.

A.- Novaj geaŭdantoj atendas la programon de nia kurt-onda servo. Iliaj adresoj estos transdonitaj al la koncernaj oficejoj. Inter ili ni salutas sinjoron *Franco Bianchi* en *Coredo*, Italio, sinjorinon *Madeleine Bouchon* en *Paris*, Francio, sinjoron *Louis Houdebine* en *Nantes*, Francio, sinjoron *Jean-François Lobut* en *Paris*, Francio, sinjoron *Andrzej Marszatkowski* en *Kartuzy*, Pollando, sinjoron *Alain Martin* en *Poitiers*, Francio, kaj sinjoron *Germain Thon* en *Figeac*, Francio.

Cl.- Sed ne ĉiuj kontentas pri la situacio de la esperanto-dissendado. Jen citado el letero de sinjoro *Sakari Kauppinen* en *Velaatta*, Finnlando : « *Se esperantistoj vivus kune en unu loko aŭ regiono, ili estus facile distingeblaj, sed nuntempe multaj radio-elsendejoj emas kredi, ke entute troviĝas tre malmultaj esperantistoj kaj ke tial disaŭdigoj en tiu ĉi lingvo estas superflujaj. Ankaŭ ĉe via elsendejo oni vidas ĉi tian emon : en **grandaj lingvoj** kiel la itala, araba kaj hispana regule multaj ĉiutagaj programoj, sed en esperanto nur **tempoŝtopoj**. Oni povas unuflanke diri **estu kontentaj, ne ĉiuj elsendejoj disaŭdigas eĉ tiom**, sed se ni volas esti realismaj, ĉu ni havas ion por esti kontentaj ? [...]* Ĉar la radio-kampo estas mia fako, mi bone konas la aferon ankaŭ vidatan de radio-elsendejoj. Grandaj nombroj da leteroj imponas, ili influas. Kiom da leteroj vi ricevas ? »

A.- En unu jaro ni ricevas kelkajn centojn da leteroj. Ni ja scias, ke ekzistas pli da geaŭdantoj ol da skribintoj. Sed ni tamen ne devas troigi la forton de la esperantistoj. Estas fakto, ke ni estas minoritativo. Estas normale, ke radio-instancoj serĉas kriterion por akiri ideon pri la nombro de la aŭskultantoj de ĉiu programero. En ĉiuj lingvoj la aŭskultantoj, kiuj skribas, ne abundas. Do, la ricevo de korespondataĵoj ŝajnas sufiĉe bona mezurilo pri la sukceso de programo. Sed ni bone konscias, ke ankaŭ la momento de la disaŭdigo en la tago havas

influan. Kiel multaj geaŭdantoj skribas, almenaŭ por la orient-eŭropaj landoj niaj disaŭdigaj horoj ne estas tre konvenaj.

Cl.- Jen citaĵo el alia plendanto. Sinjoro *Lajos Niederfriniger* en *Budapest*, Hungario, skribas :  
« *Mi pardonpetas pri mia indiferenteco, malmulte mi korespondas kun vi, kvankam bone mi scias, kiel gravegas la reagoj de aŭskultantoj por via redakcio. [...] Domaĝe, ke kelkaj fridpisaj direkciaj moŝtoj aŭ ĉefoj eldiras simile – Radio programo estas aŭskultata, kiu ricevas multajn leterojn. Bedaŭrinde ili ne konscias pri la neceso kaj gravo de viaj elsendoj en esperanto. Tute certe, ke cento da miloj aŭskultas viajn vortojn en la mondo. Bedaŭrinde ne ĉiuj reagas per leteroj.* »

A.- Ni opinias, ke sinjoro *Lajos Niederfriniger* troigas la nombron de nia geaŭdantoj. Anstataŭ cento da miloj, kiuj nin aŭskultas, ni jam kontentiĝu de kelkaj centoj da personoj. Ekzistas en la esperantismo iuj mitoj. Unu el tiuj mitoj estas la granda nombro de esperanto-parolantoj. Sen tro erari, oni povas aserti, ke nuntempe ekzistas pli ol centmil esperanto-parolantoj en la mondo, sed tute certe tiu parolantaro ne ankoraŭ atingas unu milionon. Centmilo da lingvanoj disigitaj en la tuta mondo sociologie kaj psikologie, ni diros eĉ kulture kaj politike, reprezentas pli grandan forton, ol centmilo da homoj bone grupigitaj sur limigita teritorio. Oni certe multe pli parolas pri la esperantistoj, ol pri la romanĉ-lingvanoj aŭ vaskoj, kvankam nombre la du lastaj homgrupoj estas almenaŭ samgravaj.

Cl.- Sinjoro *Géo Junier* en *Gray*, Francio, skribas : « *Efektive en nia rondo ni regule aŭskultas vin dum elsendoj en esperanto. La ĝustigo de nia granda intereso estas la fakto, ke en nia urba klubo estas multaj eksterlandaj laboristoj : portugaloj, turkoj, jugoslavo, araboj, kie nura interligilo estas la internacia lingvo. Do, viaj informoj estas la solaj, kiujn ili povas aŭskulti kune.* » Jen sciigoj, kiujn ni ŝatas povi prezenti al la radio-direkcio. Bedaŭrinde malabundas en la korespondaĵoj, kiujn ni ricevas, tiaj pozitivaj sciigoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !